# LA TAŬRA VOĈO

**Kongresa Kuriero de la 108a Universala Kongreso**

**Mardon, la 1an de Aŭgusto 2023** **Numero 4**

## La fotorakonto de la unuaj tagoj per la okuloj de John Huang

### La Movada Foiro







### La Inaŭguro







### La Nacia Vespero









La grupa foto

La akceptado de la kongresanoj

La movada foiro




Snodo OGR Cult
ESPERANTO
MI AMAS
ESPERANTON


ESPERANTO
© John Huang Photography

## ANONCOJ

### Ekspozicio "Amikeco"

La ekspozicio kun la premiitaj fotoj de la Foto-konkurso "Amikeco" kiu okazis kadre de la AMO-seminarioj de UEA estos i.a. starigita en la salono Hodler okaze de la programo de la Tago de lernado, marde de la 9a ĝis la 15a horo.

*Marija Belošević KN 117*

### EsperRadio





EsperRadio - La Frateca Radio estas en Torino dum la UK kaj estos en Lignano Sabbiadoro dum la kunkongreso de ILEI kaj TEJO por esti la Esperanto-Voĉo raportante pri la programeroj. Ni elsendas tra la tuta mondo por partoprenigi ĉiujn en niaj eventoj.
www.facebook.com/esperradio
www.youtube.com/@EsperRadio

### Kleriga Lundo

François Lo Jacomo: Kiun rolon havu la Esperanto-movado pri Ĝemelaj Urboj (ĜU).
Post projekciado de la filmo farita de Lo Jacomo (KN41), estrarano de UEA, la ĉirkaŭ 40 ĉeestantoj vigle diskutis, prezentante siajn spertojn, farante demandojn kaj sugestojn. Partoprenis pluraj reprezentantoj de urboj ĝemelitaj: Parizo, Darmstadt, Liegxo, Tübingen, Montrealo… La komisiito de UEA, Mark Ĵiro (KN95), parolis pri la avantaĝoj de ĜU por faciligi rilatojn kun urbestroj, anoncis planojn por 2024. Oni akcentis la efikojn pri informado per gazetaro, por ricevi subvenciojn, ktp.

*Aleks Kadar KN 39*

### Revene al hejmo, cent jarojn poste




La patro de matematika logiko, italo Giuseppe Peano (1858-1932), estis profesoro de la Universitato de Torino (strateto ĝuste malantaŭ la kongresejo omaĝas lin). Al ni li estas konata pro lia intereso pri planlingvoj. Li estis la patro de "Latino sine flexione" (latina sen fleksio), ekde 1910 sub la nomo Interlingua (IL). Peano prezidis en Torino sian "Academia pro Interlingua". Por nia ĉijara Kongreso, revenis al Torino karto skribita (franclingve) kaj subskribita de Peano en 1919, kiun la matematikisto sendis al la perua gazeto "Antaŭen Esperantistoj". Pri tiu karto kaj multaj aliaj kolektindaj filatelaĵoj kaj esperantaĵoj oni parolos en la publika kunveno de ELF/AREK. Ĝi inkluzivos la prezentadon "Migrantoj tra Esperantujo kaj aliaj esperantistoj en la tempo-maŝino de poŝtkartoj" (salono Grattapaglia, vendredon, 14h30-15h30).

*James Piton, KN 339*

## PROGRAMO

### UEA respondas

La Estraro kaj Ĝenerala Direktoro de UEA volonte respondos viajn demandojn, inkluzive tiujn faritajn dum la sesio KIO FARENDAS? de Humphrey Tonkin. Ni ĝisdatigos vin pri nia agado, inkluzive kion ni jam faris kaj planas fari en nia strategia planado pri la rekomendoj donitaj en tiu sesio. Ĉiuj bonvenaj!
(Hodiaŭ - 14h00 Canuto)

*La Prezidanto de UEA - Duncan Charters*

## KOMUNIKOJ

### Kroma drinkejo

Post la tagmanĝo eblas trinki bonan kafon, kaj repreni siajn fortojn, ĉe la kafejo MixTO tuj apud la universitata manĝejo. Krome se oni volas oni povas eĉ tagmanĝi kaj vespermanĝi. Ĝi estas malfermita de la 12h00 ĝis la 19h00.

*Eric P.J. Nemes KN 355*